

Jos. Ornstein.
Ĉef-instruisto.

Mechelen, la 18an de aprilo 1940
Locomotiefstraat 12

S-ro Gerard Debrouwere

Kortrijk.

Estimata S-ano,

Antaŭ kelkaj semajnoj mi revenis el Norvegujo, kie mi dum $2 \frac{1}{2}$ jaroj instruis nian lingvon.

Pri la tre aktuala temo "Norvegujo - lando kaj popolo" mi nun prelegis i.a. en Gent kaj Antwerpen.

Pro la sukceso de tiu parolado mi ŝatus fari ĝin ankaŭ en : Bornem, Aalst, Oudenaarde, Kortrijk, Faralbeke, Tielŝ, Veurne Nieuwpoort, Oostende kaj Brugge en la komenco de Majo.

La paroladon ilustras 60 lumbildoj kaj 5 gramofondiskoj. Mi bezonas epidiaskopon kaj gramofonon (se eble kun "pick-up"). Se epidiaskopo estas malfacile havebla mi povas prelegi ankaŭ sen lumbildoj.

La kondiĉoj estas: 75fr. kaj gastigo (prefere ĉe s-ano) dum unu tagnokto. La vojaĝkostojn mi mem pagas. Se ne en ĉiuj lokoj okazos parolado la kostoj iĝos iom pli altaj, ĝis maksimumo de 100 fr.

Mi petas vin tuj respondi ĉu vi povas ion aranĝi, por ke mi povu fiksi la daton kiun mi sciigos al vi poŝtrevene.

Kun intereso atendente vian respondon', salutas s-ane'



Al S-ro J. Ornstein
Locomotiefstraat 12
M e c h e l e n .

6-5-40.

Estimata samideano,

Koncerne la proponita parolado, mi ne povas doni kuraĝigan respondon. La lasta kunveno de la sekcio Kortrijk kunigis 3 personojn kaj en la aliaj lokoj ŝajne la situacio ne estas multe pli brila.

Al 39 sekcioj mi sendis leteron por institi al pli vigla laboro kaj venis nur 3 respondoj, ĉiuj neaj.

Certe la temo "Norvegujo" estas aktuala sed tamen estos neeble vekti ŝufiĉe da intereso por parolado en Esperanto. Similan fiaskon spertis alia asocio en Kortrijk, kiam ĝi aranĝis paroladon kun filmoj pri Finnlando.

Kun sinceraj salutoj,